

LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
 REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kč 20.—; fremdlando Kč 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
 lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271.

LA XXII.

En societo de kvar ĉefaj gesamideanoj mi forlasis vagonare la 3-an de aŭgusto Prahon, por tra Germanujo kaj Belgujo atingi la kongresurbon Oxford. La vojaĝo ne estis multekosta parte pro la al la kongresanoj disponigitaj rabatoj fervojaj en Belgujo kaj Anglujo kaj sur ŝipoj inter Ostende kaj Dover, parte pro la al ni nekufima kaj tute malsama vivmaniero en Anglujo.

Pasiginte nokton en Londono, mi la sekvintan antaŭtagmezon vizitis la modelan esperantan oficejon sur High Holborn kaj posttagmeze alvenis Oxfordon, la mondfaman universitatan kaj kolegian urbon kun 60.000 loĝantoj, jam plenplenan de esperantistoj, kiuj por unu semajno per sia esperanta interparolado, insignoj kaj flagoj donis al ĝi esperantan karakteron. Pro manko de hotelĉambroj mi ekloĝis en privata antikva domo de s-o Gibbons, kiu, alportante ĉiutage je la 9. h. kruĉeton da varmega akvo, min, ellitiĝintan jam je la 6a, vekadis per forta batado sur la pordon, kaj kie mi ĉe matenmanĝo komune disponigata je la 9¹/₂, babiladis kun 3 samideanoj el Skotlando, Svedujo kaj Bulgarujo. La matenmanĝo, konsistanta el 7 manĝaĵoj, estis tiel riĉa, ke ofte oni ekmalsatis nur vespere aŭ nokte, kiam la restoracioj (post la 22-a h.) estis jam fermitaj. Tiam oni vizitadis t. n. „tutnoktan restoracion“, malgrandan kaj senseĝan, por — starante pro manko de loko sur la korto aŭ sidante sur la veturiloj — manĝi sandviĉojn

kaj trinki teon, kafon aŭ nebonan anglan bieron.

La urbodomo servis kiel kongresejo. Ĉi tie okazis la kongresaj laborakunvenoj, somera universitato, UEA-kunveno, publika Ĉe-kunveno kaj specialaj kunvenoj de ICK, KR, Generala estraro, Lingva komitato kaj UEA-estraro, (dume la fakaj kunvenoj okazis en proksima, majesta kolegio „Christ church“), ĉi tie la vicurbestro dum la urbestra gastigo ĉe la enirejo premis la manon al ĉiu el 1211 gekongresanoj de 30 nacioj kaj 29 ŝtatoj, kiu ceremonio daŭris 1¹/₂ horon. En la urbodoma salonego, ornamita per flagoj de la reprezentitaj nacioj, okazis la 3. VIII. solena inaŭguracio de la XXII.-a, kies akuratan malfermon trudakiris per kantado de esperantaj kantoj, ritma aplaŭdado kaj batado helpe de pluvombreloj kaj bastonoj la anglaj samideanoj. La festparolintoj ŝerce, kiel kutime en Anglujo, preparolis seriozajn temojn, kio sentigis la malnovajn gesamideanojn, ke mankas ĉi tie la kongresa festatoro dro Privat, kies kongresaj paroladoj laŭforme kaj laŭenhave penis bone anstataŭi la neforgeseblajn kongresajn paroladojn de la Majstro.

Krom la seriozaj partoj la universala kongreso enhavis ankaŭ la amuzajn: Komedio „La onklino de Charley“, kies aktoraro apartenis al 5 nacioj, tre plaĉis spite de la netaŭga ejo kaj fumado flanke de kelkaj ĉeestantoj! Dum elmontrado de la naciaj dancoj madjara samideanino dancis „ĉardaŝon“, akompanatan per melodio de ĉefa sokola

Kĉ 16--

Zaŝlete svĵ ĉiŝpĉveku Svazu na rok 1930 bianco-sloĝenku na ŭĉet u Poŝtovniĥo ŭřadu ŝekovĉho, ĉis. 9,602: Svaz ĉsl. esperantistŭ.

kanto „Slavo mi estas, Slavo mi restas...“, kiu kaŭzis tujan malbenadon de la konata sokolĝvidanto kaj samideano so H. La balon malbeliĝis iomete la fantaziaj kostumoj, anstataŭantaj ĉe kelkaj samideanoj la naciajn. La ekskursojn, el kiuj unu iris al reĝa rezidejo Windsor, mi ne ĉeestis, uzante la liberan tagon por prilabori la kongresan materialon kaj iomete ripozi post la kelktaga laciga laborado.

Dum la kongreso proponis angla komunisto ne ludi en kongresejo anglan naciaĥimnon, kio estis memkompreneble rifuzita, ĉar per la ludado de la tiurilata nacia ĥimno la eksterlandaj ĝesamideanoj estimas la ĝastigantan landon kaj urbon; same oni malprobis la proponon eligi el naciaj kantoj kaj esperanta ĥimno la vortojn, atentigantajn pri la milito, politiko ktp. En la kunveno de la Ĝenerala estraro oni, priparolinte la malutilojn, faritajn al la movado de kelkaj neseriozaj homoj, misuzintaj esperanton plejparte por montrompado, decidis fondi ĉe ICK „plendlibron“, kie oni eternigus la nomojn, kolektus informojn kaj disponigus ilin poste al la naciaj societoj por malhelpi la „laboron“ de la pseŭdoapostoloj“.

La venonta universala kongreso okazos en la j. 1931 en Krakovo, urbo de la VIIIa, kie dro Zamenhof faris en la j. 1912 sian lastan kongresan festparoladon, transdoninte, ne dezirante plu esti Majstro sed simpla pioniro, la ĝvidadon de la movado al tiurilataj centraj organizaĵoj; Ĉeĥaj esperantistoj havos do honoran devon aranĝi antaŭaŭ postkongreson en ĈSR kaj konatigi ĝiajn naturajn belaĵojn kaj memorindaĵojn al internacia samideanaro.

La bone aranĝita kongreso de Oxford pasis; multan sukceson al tiu en Krakovo!

Dr. Aug. Pitlik,
vicprezidanto de la XXIIa.

Mate jiĝ Ŝilhovu uĉebnici? Za 10.60!

Pani Biske a esperantism.

Vzĥledem k zpravam o pani Biske v dennim tisku, prohlašujeme:

Pani Biske nejen u nas, ale i v jinych zemich poradala sice kursy esperanta a esperantem ziskavala priznive a podporovatele, ale stala mimo hnuti esperantistu a proti nemu. Oficielni esperantske instituce i osobnosti pred ni varovaly stoupence (red. La Progreso v listopadu 1929), redakce i ŭřady a vylouĉily ji ŭĝ davnio ze svĉho středu (1916). Zato ona zakladala v zemich svĉho doĉasneho pobytu (take v ĈSR) vzdorokluby ze svĉch dŭvĉřivŭch a neinformovanych ŝakŭ a ŝvala proti vedoucim osobam hnuti svetoveho i ĉeskoslovenskeho. Jeji vystupovani bylo od zaĉatku dŭrazne odmĉtano vsemi odpovĉdnymi, soudnymi a vahnymi esperantisty ĉeskoslovenskymi i cizimi pro svoji vŭstřednost a zahadnost. Pokud ji nekteři omameni dŭvĉřivci mezi esperantisty vzdor vŭstraham neprozirave podporovali ať morálne ať materielne (jako sl. Hl. a j.), jednali tak vĝdy jako soukromi jednotlivci nejĉastěji z dŭvodŭ ĉistě humannich, někdy i z oposice k vedoucim ĉinitelŭm. S hnutim esperantistu nemá afera pani Biske nic spoleĉneho. Pani Biske jen zneuživala esperanta k svĉm osobnim cilŭm. O tom, jde-li u pani Biske o zjev chorobny ĉi zloĉinnŭ, ponechavame rozhodnuti soudŭm a ŭřadŭm.

Zaslal jste předplatné na tento rok?

La felĉa angla lingvo.

Venis al Praha hinda sciencisto kaj la ĉsl. hindologo profesoro Pertold invitis lin al vespermanĝo en sia loĝejo Bubeneĉ Ŝvecová (legu kiel skribite). La ĝasto venis tre malfrue kaj senkulpigis sin ekscitite: „Kiajn aŭtomobilistojn vi havas en Praha! Tio estas terura, ili ja tute ne konas la urbon. Tiu homo min veturigis preskaŭ unu horon tra la urbo kaj ne estis kapabla trovi vian domon. Se mi ne estus min turninta al policisto, mi tute ne estus atinginta vin.“

„Ne eble“, ekmiris la ĝastiganto. „Kiel vi indikis al la aŭtomobilisto mian adreson?“

(Daŭriĝo v. p. 71.)

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333

NUMERO 30.

OKTOBRO 1930.

III-a KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

okazis en Praha, kafejo Union,
la 4. X. 1930, je la 20.15 horo.

Ĉeestis: Ginz, Herzigová, Hromada, Kamaryt, Pitlík, Sklenčka, Slavík, Sustr, Tarantíková. Klariĝis sian venon: Friedrich, Holancová, Brambora. Zemek, Kudela, Vondroušek.

1. Protokolo pri la II-a komitata kunveno estis aprobita sen legado, ĉar ĝi aperis en Bulteno.

2. Konsisto de la komitato. La nomaro sur paĝo 56 estas definitiva.

3. Kunveno de ĈAE-anoj de Praha okazis la 30. V. en Odborový dům Malfermis ĝin vicprezidanto de la E. K. en Praha s-ro Sustr kaj transdonis la gvidadon al vicprezidanto de ĈAE s-ro dr. Pitlík, kiu preparolis la instrumentodon de la Linguaphone kaj kaj vidigis kaj aŭdigis la koncernajn diskojn. Poste estis laŭlegata la raporto de la ĝenerala sekretario, publikigita poste en P. sur paĝo 50. Partoprenis ĉ. 50 personoj.

4. Varbado de membroj. La kasisto dissendis en fino de septembro al ĉirkaŭ 300 adresoj de membroj nepagintaj en pasintaj tri jaroj cirkuleron subskribitan de la prezidanto. Sajnas, ke ĝi vekis sufiĉan intereson ĉe la adresatoj kaj ke revenos al ni notinda parto de ili. — Estis eldonita flava cirkulero, per kiu la kasisto kvitanco al ĉiu paginto la kotizon aŭ alian pagon. — En fino de la jaro ni eldonos presitan cirkuleron kaj dissendos ĝin al ĉiuj disponeblaj adresoj por varbi kaj revarbi.

5. Propaganda materialo. Al petoj por ĝi ni respondos per sendo de la taŭga kvanto de „Pojiťko“.

6. Multobligata aparato estas jam en loĝejo de s-ro Slavík, kiu faris per ĝi jam plurajn cirkulerojn. Oni dankas al li pro lia daŭra pretenco por tiaj laboroj.

7. Esp-o kiel ilo por ree internaciigi parolantan filmon. Ver-

ki pri tiu aktuala temo artikoleton por P. kaj ĵurnaloj estas petata D-ro Pitlík.

8. Filmo pri Danujo kaj Paramount-filmo kun esp. dialogo La traktadoj de s-roj Ginz kaj d-ro Pitlík estos daŭrigataj por ebligi publikan prezentadon en CSR.

9. Rilatoj kun niaj centraj institucioj. Al Konstanta Reprezentantaro ni pagis por jaroj 1928 kaj 1929 por ĉiu jaro po 150 membroj sume Kč 600.— Tiamaniere ni estas seninterrompe ĝiaj membroj. En la jaro 1930 ni esperas havi multe pli grandan sumon da membroj, tial estos la kotizo pli proporcia al nia graveco en internacia movado.

Al Bibliografia servo de UEA ni donacis po 2 ekz. de: Bohema esperantisto VI. jarkolekto, Úvahy o jazyce mezinárodním, Jazyk všeslovanský a esperanto. La librojn ni ricevis por tiu celo donace de dr. Kamaryt. —

Al I. Centra Komitato ni sendis informojn: pri Zamenhof-strato en Bratislava (kun trilingva gvidlibro pri Bratislava enhavanta novan nomaron de stratoj, en kiu jam enestas tiu strato); pri esperantlingvaj turismaj eldonaĵoj de la ĉsl. ŝtataj fervojoj (12 ilustritaj kartoj, Krkonoše, eldonitaj laŭ iniciato de nia vicprezidanto d-ro Pitlík). — I. C. K. gratulis nian fervojan ministerion pro eldono de la ilustritaj kartoj kaj de Krkonoše.

10. Kotizo por Universalaj kongresoj. Laŭ propono de d-ro Pitlík oni unuanime decidis proponi al ICK, ke la oficialaj reprezentantoj de la Naciaj Societoj delegitaj por kongresa kunveno de la KR estu liberigitaj de la kongresa kotizo.

11. Turismaj eldonaĵoj de la fervoja ministerio. Laŭ iniciato de d-ro Pitlík ni proponos al la ministerio esperantigon de plua turisma propagandilo.

12. Gazetara servo dissendis laŭ raporto de s-ro Ginz 350 ekz. de la 1-a cirkulero. Venis 35 aliĝoj de la kunla-

borantoj, kiuj prizorgas kune 50 gazetojn, el kiuj aperas 27 en Bohemio, 9 en Moravio, 5 en Slovakio kaj 9 estas fakaj revuoj. Baldaŭ aperos dua cirkulero. Al gazetoj, por kiuj mankas kunlaboranto, estos senditaj taŭge adaptitaj represoj el la P. por provi la sukceson de tia aranĝo.

13. Radio. Al estro de la komisiono s-ro Ginz (en Praha-II., Stárkova 13) venis jam aliĝoj de la kunlaborantoj. Kiam ilia nombro estos sufiĉa, oni trovos taŭgajn korespondantojn pri radioaferoj. Sed oni neniam forgesu pri ĉia entrepreno en radiosfero turni sin al nia komisionestro.

14. Internacia somerrestadejo en ĈSR. Oni traktas pri ĝia baldaŭa fondo.

15. Kasaj aferoj. Prezidanto transrigardis kaj kontrolis (dum 25—29 IX. 1930) la kontlibron, libron de membraro kaj la financajn dokumentojn. Li volas konstati, ke la nuna kasisto jam prenis gvidadon de la kasaferoj en siajn spertajn kaj laboremajn manojn. Samtempe la prezidanto konstatis la zorgon kaj precizecon de ĉiuj asociaj kasistoj kaj dankas al ili ĉiuj je nomo de nia asocio. Precipe li volas konstati, ke ankaŭ tiam, kiam nia multjara ĝenerala sekretario devis pro okaza nefunkcio aŭ foriro de la kasisto preni en siajn manojn mem kaj sola krom siaj laboroj sekretariaj kaj redakciaj ankorau la kasaferojn, estas la enskriboj en la libroj kaj dokumentoj same zorge kaj sperte faritaj. S-ro Hromada meritas pro tiu ĉi daŭra disponebleco de siaj laborkapablo kaj akurateco specialan dankon de ni ĉiuj. — La kasisto informas, ke post la dissendo de la admonaj cirkuleroj venas tiom da korespondaĵoj kaj pagoj, ke ne estas eble nun doni ciferojn dokumentajn. Ĝi okazos en venonta kunveno. Ĝis nun venis kiel kotizoj Kĉ 2121.— Ĉe la poŝtĉeka oficejo subskribos laŭ definitiva aranĝo s-oj Dr. Kamaryt, Dr. Pitlík, Slavík, ĉiam du komune.

16. Korespondantoj Asociaj. Laŭ alvoko en Teritoria Tribuno anoncis sin tri. Oni esperas, ke venos pluaj. Oni klopodos ankaŭ varbi ilin dum korespondado.

17. Esperanto ĉe fervojoj. Laŭ

iniciato de s-ro Inĝ. Novák el Plzeň ni utiligos la permeson pri la „esperanto-ŝildoj“ en stacidomoj. Pri la ceteraj instigoj ni traktos plue.

18. Esperanto en lernejojn. La kunveno traktis pri informoj de ICK. Por apogi la farotan memorandumon ni dissendis al esp-istaj kluboj en ĈSR peton, ke ili sendu rezolucion pri enkonduko de esp-o en lernejojn. La 4-an de oktobro parolis nia prezidanto kun lerneja ministro dr. Dérer pri la projektata propono. La ministro proklamis, ke li ne malfavoras la projektton.

19. Moraviaj Esperanto-Pioniroj, eldona societo en Olomouc, informis nin per nia prezidanto, ke ili intencas eldoni novan gazeton ne atencante la situacion de la Progreso. La prezidanto en detala letero malkonsilis al ili efektivigon de ilia intenco. La komitato unuanime decidis konsili al la tiom meritplena eldonejo ne efektiviĝi tiun projektton, kiu kaŭzus konkurencon malutilan kaj sencelan. Ĝi petas samideane la Olomoucajn amikojn konservi iliajn kapitalojn kaj laborpovon al plua eldonado de la esperantlingvaj libroj, en kiu fako ili akiris jam tiom valorajn rezultojn. Detala informo estos al ili donita letere.

20. Kongreso en Oxford. Ni estis reprezentitaj de nia vicprez. dr. Pitlík. Li salutis la kongreson je nomo de la Ĉeĥoslovakoj (en sia parolado li menciis la rememoron de Jeronym).

21. Elektoj en I. Centran komitaton. Post raporto de dro Pitlík, reprezentinta nin tiun jaron en KR, oni esprimis bedaŭron, ke pro la lastminuta deklaro pri kandidateco de s-ino I. ne estis elektita nia membro en I. Centran komitaton.

22. Centra fremdula konsilantaro (Ústřední cizinecká rada). Ni petos, ke ni ricevu rajton sendi delegiton. La petskribon skribigos taŭgatempe dro Pitlík.

23. Instruistaj ekzamenoj. Oni atentigas instruistojn, kiuj volas esti ekzamenataj pri esperanto por civitanaj lernejoj, ke ekzistas ĉe nia asocio fondaĵo por rekompenci al la kandidatoj la elspezojn kaŭzitajn per la ekzameno (vojaĝo, depago).

24. Grafikista unuiĝo jugosla-

va. S-ro Ginz dissendis al 86 ĉsl. gazetoj cirkuleron kun peto sendi ekzempleton por gazeta ekspozicio en Zagreb.

25. Parolad-vojaĝo Scherer. Ni petos ICK-on pri la kondiĉoj.

26. Ekspozicia materialo (administrata de s-ro Sustr). Unu pruntinto (R. K.) resendis unu kolekton kun tia malzorgo, ke mankis 110 pecoj.

27. Pri ebleco aranĝi kongreson nacia en jaro 1931 oni traktos en venonta kunveno. Niaj anoj diru al ni siajn opiniojn kaj proponojn!

28. Arkivo. Nebinditajn jarkolektojn de la gazetoj transdonos s-ro Slavík al s-ro Sustr. Peton de la ĝen. sekr., ke la komitato liberigu lin iom de la amaso da arkiva materialo oni traktos venonte.

29. Informojn el Brno pri la postkongresaj aranĝoj sendis afable s-ro Vondroušek. Oni traktos la aferon post aŭdo de la alia partio.

Fino de la kunveno je la 1-a horo.

Dr. Stan. Kamaryt **A. Tarantíková**
prezidanto. protokolisto.

Dankoj al eksiginta prezidanto de ĈAE. Ni publikiĝas leteron senditan da la nuna prezidanto de ĈAE al ĝia prezidinto.

Bratislava 19. V. 1930.

Al s-ro J. Eiselt,
honora membro de Ĉsl. Asocio Esp-ista,
en Praha.

Tre estimata sinjoro reg. konsilanto, transprenante la prezidaton de nia asocio mi ne povas, tre ŝatata amiko, ne diri al Vi je nomo de mi mem kaj je nomo de ĉiuj niaj membroj sincerajn dankojn pro la gravaj servoj, kiujn Vi faris al nia afero dum Via prezidado.

Estante devigata partopreni en nia kunlaborado plejparte sole per leteroj kaj ne persone, mi havis la plej bonan okazon observi kaj admiri Vian persistemon, afablecon, paciencon, modestecon kaj ĉiujn aliajn eminentajn kvalitojn, kiuj ebligis al Vi tiom efike servi al nia idealo.

Bonvolu akcepti pro tio ankoraŭ unufojan esprimon de mia admiro kaj danko, kaj estu certa, ke Via laboro ne estis vana. Mi kun ĉiuj kunlaborantoj klopodos, ke ĝiaj fruktoj ne estu konsumataj per malvigleco.

Tute Via

Dr. Stan. Kamaryt,
prezidanto de Ĉ. A. E.

LA XI. JARKUNVENO DE ĈAE.

Ĝi okazis en Praha la 13. Aprilo 1930 en kafejo Urban (matene) kaj en Odborový dům (posttagmeze). Je la 9. horo ne ĉeestis la laŭstatute necesa kvarono de la membroj. Tial nova jarkunveno estas malfermita je la 10. horo. Prezidas D-ro Kamaryt, VP de ĈAE, anstataŭ la rezigninta prezidanto.

Ĉeestas 29 membroj kaj 5 gastoj. La membroj estas el jenaj 9 lokoj: Bratislava, Brno, Hostivař, Hradec Král. (3), Pötštein, Pardubice, Praha (19), Přelouč, Rumburk. Plenrajtigilojn sendis 20 membroj. (Pardubice, Zelezník, Zábřeh, Veleň, Praha (6), Kolín, Brno, Šumvald, Jaroměř, Náchod, Košice, Hradec Králové, (2), Zlaté Moravce, Bakov.) En la kunveno matena partoprenas do 49 voĉoj.

La VP rememoras la mortintajn membrojn prof. Stejskal Stan., Jos. Dolanský kaj V. Poppe.

Salutleteroj venis de: redakcio de Hungara Heroldo Budapest, Germana Esperanto-Ligo en ĈSR Liberec, Ĉsl. Esperanto-Instituto Praha, Esperanto-Amikaro Praha, Laborista Societo Pízeň-Peklo, E. Klubo Bratislava, F-ino Šupichová Praha, prof. Vlad. Jukl Bratislava. — S-ro Sustr salutas en la nomo de la redakcio de Heroldo de Esp., S-ro Votrubec por Ilepto kaj por Asocio de eldonistoj kaj redaktoroj en ĈSR., S-ro Sklenčka por UEA kaj S-ro Koutek por Eŭbiotika movado.

S-ro Hromada legas koncizan protokolon pri la lastjara ĝenerala kunveno en Pardubice. Aprobata.

Sekvas raportoj:

1. Raporto de la ĝen. sekretario. Vidu aparte.

2. Raporto de la Junulara Sekcio, verkita de S-ro Novák Jaroslav, legata de S-ro Hromada. Vidu aparte.

3. Raporto de la I. sekretario S-ro Robert Bloch. Li raportas pri siaj laboroj por la Postkongreso en Praha kaj la karavano Budapest—Brno—Praha, pri subvencioj de la ministerio kaj de la urbo Praha; li reprezentis ĈAE ĉe la Budapesta kongreso.

4. Raporto pri la Bulteno. Ing. L. Berger klarigas, ke la 3-n-ron de la Bulteno li ne plu eldonis, sciiginte, ke

li devus publikigi en ĝi la novan decidon, ke la pluaj Bultenoj aperos ree kun la Progreso.

5. Raporto pri la Ekspozicia materialo, prezentata de S-ro Sustr. S-ro Sklenčka deklaras, ke li estas preta disponigi por bezonoj de ĈAE la ekspozician kolekton de UEA.

6. Raporto de D-ro Kamaryt pri Sciencia Sekcio. Vidu aparte.

7. La raporton kasistan legas S-ro Hromada. Ĝi estas farita de S-ro Slavík. Laŭ ĝi la Asocia havaĵo la 31.12.1929 estas Kĉ 9.205.—. La administra aktiva restaĵo estas Kĉ 544.—. La kontojn reviziis S-ro Frant. Novák. S-ro Weisskopf rifuzis revizii ilin pro malmulte da tempo disponebla. Laŭ propono de S-ro Sklenčka la raporto pri la financoj de la Asocio estis aprobita (unuanime) kun aldono, ke la novaj revizoroj reviziu ĝin kaj raportu al la nova komitato en femplimo de unu monato.

Je la 13. horo la prezidanto interrompas la kunvenon. Post tagmanĝo daŭriĝo de la 15. horo en Odborový dům.

Debato pri la raportoj.

Dr. A. Pitlik, altteknik-lerneja lektoro diras: La laboro pri kiu raportis ĝenerala sekretario kaj ceteraj funkciuloj estas atentinda kaj dankinda. Speciale li volas atentigi pri jenaj punktoj: Oni devus atentigi pri jenaj punktoj: Oni devus atentigi la instruistojn, kiuj volas esti ekzamenataj pri esp-o por la civitanaj lernejoj, pri uzo de la Asocia fondaĵo por kovri iliajn koncernajn vojaĝelspezojn. Oni devus pli vigle zorgi por akiri ian ĉambron por la Asocia oficejo, eble de ia publika aŭtoritato. Oni denove provu havi pagatan oficiston por la Asociaj laboroj. La statuto de la Asocio estu reformita kaj modernigita. Estas bedaŭrinde, ke la kongreso en Olomouc ne okazos tiun ĉi jaron; oni esperu, ke la Dresdenaj aranĝoj signifos ankaŭ por ni vigligon de publika intereso. — Plua eldonado de Bulteno kun Progreso estas rekomendinda precipe nun, kiam Progreso denove regule aperas; la redakcio de Progreso povas esti tre kontenta kun la ĉi-jara tria numero dediĉita al Masaryk. Sed la tipografio

de la kajeroj devus esti tia, ke oni povu Bultenon ĉiam separi de la ceteraj paĝoj; eĉ numerado de paĝoj devus esti aparta en la Bulteno. Estas fondata Masaryk-muzeo: oni ne forgesu proponi al ĝi akiron de ĉiuj esperantaj publikajoj pri Masaryk.

S-ro Eiselt bedaŭras, ke la komitato decidis rean komunan aperadon de Asocia Bulteno kun la Progreso sub la redakto de S-ro Hromada. Per akraj vortoj li asertas, ke S-ro Hromada kiel funkciulo de UEA kribras la enhavon de la Bulteno por ne malplaĉi al Genevo. Tion oni evitus, se la Bultenon redaktus iu alia.

S-ro Hromada deklaras, ke li kiel redaktoro havas ne nur rajton sed ankaŭ devon kribri t. e. elekti kaj aranĝi la enhavon de la Bulteno same kiel de la Progreso.

S-ro Eiselt daŭrigante, deziras, ke el la raporto de la ĝen. sekretario estu strekita la frazo, laŭ kiu la protesto al UEA estis akceptita per 4 komitatanoj kaj 2 vickomitatoj de ĈAE: laŭ la parolanto tiu konstato volas malgraviĝi la decidon.

S-ro Hromada konsentas kun la streko. — D-ro Kamaryt atentigas, ke ne povas esti ia malbona intenco, ĉar en ĉiu raporto pri la komitataj kunvenoj troviĝas indiko, kiom kaj eĉ kiuj personoj ĉeestis. Tiuj raportoj estis jam publikigitaj antaŭ kelkaj monatoj en la Progreso.

S-ro Eiselt daŭrigante, atentigas, ke laŭ la letero de UEA, legita en la raporto de la ĝen. sekr., UEA sciigas, ke ĝi revenas al sia malnova maniero de la lokonomoj en la Jarlibro. Kontraŭ tiu maniero ni plendis kaj devas plendi, ĉar ĝi ofendas niajn nacion kaj lingvon. La informoj pri la loko devas ĉiam aperi sub la ĉefa nomo, ĉar tiu ĉi estas oficiala.

S-ro Sklenčka klarigas la uzadon de lokonomoj en la Jarlibro 1930. La lokonomoj estos presitaj tiel kiel ilin indikis la delegito, kun kondiĉo, ke la alilingva lokonomo estas ankaŭ oficiala. Per helpo de la leksikono eldonita de la ministerio de poŝtoj kun la kunlaboro de la ministerio de fervojoj, li kontrolis la tufan ĉeĥoslovakian parton de

la Jarlibro 1930. Li povas certigi, ke neniŭ neoficiala nomo troviĝos en ĝi.

S-ro Hromada legas la koncernan tekston de la leĝo por pruvi, ke la leĝo pri lokonomoj ligas sole la ŝtatajn oficojn kaj entreprenojn, sed neniun alian. Laŭ tiu leĝo ankaŭ germanaj nomoj de certaj lokoj estas oficialaj kaj la ŝtato permesas kaj toleras ilin. Tiom pli toleru ilin ni esperantistoj, batalantoj por la toleremo inter la nacioj.

Debaton partoprenas ankoraŭ S-ro Bloch, Tarantíková, Berger, Dr Fousek (por la opinio de Eiselt), S-ro Šustr kaj Ginz (kontraŭ). D-ro Pitlík diras, ke li ja estis la unua, kiu sistempe protestis, sed li konstatas jam pliboniĝon kaj esperas plian en la venontaj jaroj.

S-ro Eiselt proponas, ke antaŭ ĉiu, ĝis nun germana presita lokonomo, estu presita la ĉeĥa nomo. La germana nomo troviĝu sub la koncerna litero, kun revoko al la ĉeĥa.

S-ro Skleněka proponas, ke la ĝenerala kunveno kontentigu kun la aranĝo de li priparolita, nome ke la teksto aperu sub la ĉeĥa aŭ la germana nomo, laŭ tio kiel la delegito ĝin skribis, kun kondiĉo, ke sub la germana nomo ĝi aperos nur tiam, kiam la germana loko estas ankaŭ oficiala kaj troviĝas en la menciita oficiala ministeria leksikono. Akceptante lian proponon la ĝenerala kunveno nuligu la proteston de la komitato.

La ambaŭ proponojn la prezidanto voĉdonigas skribe. El 47 voĉdoniloj 29 estis por la propono Skleněka, 18 por la propono Eiselt.

Komuna kunsido de ĈAE kun GEL. S-ro Skleněka prezentas la deziron de GEL (transdonitan de ĝia prezidanto Ing. Scholze), ke kunvenu baldaŭ la estraroj de ĈAE kaj GEL por trakti pri: lerneja reformo kaj esperanto, pri komuna entrepreno propaĝanda. La kunveno estus en Praha aŭ en Hradec Králové. Akceptita en principo, la detalojn preparos la nova komitato.

Post tio, la ĝenerala kunveno akceptas senŝarĝigi la malnovan komitaton.

Elektoj: S-ro Hromada klarigas, ke

la lasta komitata kunveno ne okazis pro manko de ĉeestantoj. Kaj ke sekve la malnova komitato ne prezentas kandidatan liston. Li legas do liston starigitan de kelkaj membroj.

Kiel prezidanto estas proponata D-ro Kamaryt Stan. en Bratislava, la ĝisnuna VP. Akceptita per aplaŭdo de la kunveno.

La nova komitato kaj la Kontrola komisiono estis elektita unuanime kiel publikigita sur p. 56.

Ĉiuj aferoj ne solvitaj de la jarkunveno estas transdonataj al la nova komitato.

Fino de la kunsido je la 18. horo.

Zamenhof-strato en Bratislava.

Urba reprezentantaro en Bratislava akceptis en sia kunveno la 14. IV. 1930 proponon de sia kultura komisiono pri nomigo de 280 novaj stratoj, kiuj estiĝis kaj estiĝas pro kresko de la urbo. Inter tiuj stratoj unu ricevis nomon de Dr. L. Zamenhof. Ĝi estas en la VIII-a kvartalo, en la propono ĝi estas signita VIII/G 1. Apudaj stratoj estas: **Fajrobrigadista, Bulgara, Kopernik, Edison.** La urbestro de Bratislava meritas nian dankon kaj gratulon pro ŝato, kiun ĝi montris al iniciatinto de tiom progresema movado, kia estas la nia. ĈAE. esprimis sian dankon per speciala letero.

Slovaka propaĝanda flugfolio. ĈAE eldonis okaze de apero de la slovaka ŝlosilo ankaŭ verdan bele presitan varban flugfolion invitantan slovaklingve: „Partoprenu movadon por la helpa internacia lingvo!“ La flugfolio rekomendas krom akiro de la ŝlosilo aceton de la lernolibroj kaj aliĝon al nia asocio kaj al UEA. Ni tre rekomendas al niaj amikoj uzi tiun novan varbilon. Precipe ni petas la klubojn, ke ili bonvolu mendi ĝin en pluraj ekzempleroj. Ili ricevos 100 ekz. por 8 Kč ĉe Ĉs. Asocio Esp. en Praha VII., Sochařská 333, aŭ ĉe Dr. St. Kamaryt en Bratislava, Telocvičná 3.

MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO

JOSEF KRUMPHOLC

direktoro de lernejoj en Přerov ĝisvivis la 19. Oktobro 1930 siajn 60 jarojn. Kiu el la ĉs. esperantistoj — nekalkulante la eksterlandajn malnovajn pionirojn — ne konus la nomon de tiu ĉi eminenta ideala instruisto Moravia, kiu kun sia kolego Th. Ĉejka en Bystřice p. Host. estas fakte fondanto de la esp. movado en la ĉeĥaj landoj. Ĝojante kun la nun vasta komunumo esperantista ni prezentas al la ŝatata pioniro niajn plej sincerajn gratulojn. S-ro Ĉejka sendis al ni interesan artikolon pri la kunlaboro kun la jubilanto; ni ĝin publikigos en la venonta numero.

Praha. La 25. Februaro 1930 okazis ĝenerala kunveno de „Esperantista Klubo“. Estis elektitaj novaj komitatanoj: S-ro Konstantín Koutek, prezidanto, S-ro Jaroslav Šustr vicprezidanto, S-ro František Staněk sekretario, S-ino R. Herzigová, kasistino.

Aliaj membroj de komitato estas: F-ino A. Tarantíková, f-ino A. Nývltová, S-ro A. Jančík, s-ro B. Kohout.

Vickomitatanoj: S-ro V. Echtner, s-ino V. Staňková, S-ro J. Boháč,

Revizoroj: F-ino R. Kratochvílová, s-ro J. Baroch, s-ro Inĝ. B. Molnár.

Dum mebraj kunvenoj la vicprezidanto, sekretario k. a. membroj raportas pri novaĵoj en esperanta movado:

28/2. S-ro direktoro Eiselt: El mitologio de ankvaĵaj popoloj.

7/3. S-ro V. Echtner: Dr. T. G. Masaryk, prezidanto de Ĉeĥoslovakio.

14/3. S-ro O. Ginz: Esperanto ĉe ĉeĥoslovakaj ministerioj.

21/3. S-ro F. Staněk: Kulturigo de nia lingvo. — Diskutado.

28/3. S-ro K. Koutek: Frazologio de esperanto.
4/4. S-ro O. Ginz: Propagando per gazetoj kaj radio.

11/4. S-ro K. Koutek: Pri vojaĝo al pacifista kongreso en Nederlando.

18/4. S-ro J. Šustr: Novaĵoj en Esperanto.

25/4. S-ro Sapiro el Polujo: Prelego pri Krakov kaj Bialystok kun diapositivoj.

2/5. S-ro J. Šustr: Japanaj lingvo kaj skribo. Finiĝis kurso de esperanto por komencantoj kun 15. lernantoj. Instruis F-ino A. Nývltová.

Finiĝis kurso perfektiga kun 20 lernantoj.

Instruis S-ro Staněk. Komencis nova kurso perfektiga por lernantoj de elementara kurso kaj por ĉiuj intereshavaj esperantistoj gvidata de S-ro Staněk en konversacio metodo.

Z **Hostivaře.** Dne 11. května 1930 přednášel o Esperantu Alois Štěpán, říd. učitel v. v. v Hostivaři, a po přednášce uspořádal kurs ve dvou týdenních hodinách z tohoto jazyka. Do kursu přihlásilo se asi 20 účastníků, většínou odrostlejší mládež.

Mortis.

S-ino Emmy Friedrichová edzino de S-ro Josef Friedrich, fervoja konsilanto en Košice, kaj nia ŝatata kunlaboranto, mortis la 17. Oktobro 1930 post longa malsano. Al la funebranta edzo kaj filineto Eva ni esprimas sinceran kondolencan.

S-ino Marie Kubásková, edzino de UEA-vicelegito en Plzeň mortis la 19. Oktobro. Ŝi estis fervora esperantistino jam de longaj jaroj kaj helpis al sia edzo propagandi. Ŝi helpis fondi laboristan societon esperantistan en Plzeň, ĉeestis kelkajn universalajn kongresojn kaj tradukis por esp. gazetoj. Honoro estu al ŝia memoro.

En **Bratislava** komence de marto 1930 disiĝis la Tablogirlando Esperantista, libera unuiĝo ekzistanta jam de antaŭmilita tempo, kaj estis fondita nova neŭtrala Esperanto-Klubo. Kiel prezidanto estis spontanee elektita la vera apostolo de loka movado s-o E. Wanitsek, vicprezidanto fariĝis senlaca samideano s-o R. Spalek, sekretario funkcion transprenis renova esperantisto s-o V. Jukl; ceteraj estraranoj estas plejparte malnovaj funkciuloj. Post havigo de sufiĉe komforta kaj alloga klubejo en moderna hotelo Tatra estis por la 15. de aprilo kunvokita solena malferma kunveno, kiun partoprenis preskaŭ 80 personoj.

Prezidanto s-o Wanitsek, memorante pri mortotago de dro Zamenhof kun profunda malĝojo sciigis la ĉeestantojn pri subita morto de la vicprezidanto s-o R. Spalek, enterigita antaŭ du tagoj. Starante aŭskultis ĉiuj la vivhistorion de ĉi tiu fervora samideano kaj vera homo. Poste la prezidanto elokvente parolis pri komencoj de la loka movado, pri agado, ofte brila, de la Tablogirlando kaj pri motivoj de fondo de la Klubo. En nomo de la Girlandanoj s-o Kiss deklaris konsenton pri la disiĝo kaj reorganizo. Sekvis parolado de s-o Dro Ka-

maryt, temanta pri disvastigo de nia movado, kiu estante spirita, okazas per malrapidaj paŝoj kaj postulas indulgemon kaj persistan laboron. Poste la sekretario donis necesajn klarigojn pri statutoj kaj agadplano. F-ino Mahr ĉarme deklamis, partoprenantoj fiore kantis la himnon kaj s-o Kiss finis la programon per bela kaj instiga poemo de Baghy: „Al nova bordo!“ V. J.

En Mnichovo Hradiště okazis la 19 Aprilo 1930 amika vespero en Hotelo „U nádraží“ (ĉe stacidomo). Partoprenis esperantistoj el proksima kaj malproksima ĉirkaŭaĵo. Ĉefe ni dankas al nia ŝatata ĉefdelegito S-ro Skleněka kun lia familio, kiu migris longan kotan vojon piede de Hradec Králové ĝis al Mn. Hradiště, kaj per bela parolo nin kuraĝigis al plua laboro en esperanto. Ankaŭ S-ro Gargula el Ml. Boleslav havis belan parolon. Poste fraŭlino M. Grindlová nuntempe vicprezidentino de nia rondeto bele ludis pianon. Estis nur domaĝo, ke plimulte da samideanoj devis jam forveturi je la 23a horo. La sekvintan taĝon kelkaj anoj ekskursis piede al Bohema paradizo. Py.

Klatovy. Laborista gimnasta unuiĝo komencis en januaro 1930 ĉiusabatan kurson por 18 p. Duono estas virinoj. Gvidas Sam-o Pelcman. Pcm.

Plzeň. La societo de Laboristaj Turistoj, kiu havas en sia programo propagandon de esperanto aranĝis en februaro novan kurson por 10 p. en laborista domo „Peklo“. Instruas Pelcman. Pcm

Plzeň. Modellignajistoj en Skoda-fabriko (30 p.) lernas esp. Instruas sam-o Pelcman.

Košice. La 30. Majo 1930 finiĝis kurso kun 12 p. (plejparte fervojistoj). Gvidis S-ro Friedrich.

Olomouc. La ĝenerala kunveno de Esperantista societo elektis la 8. 5. 1930 jenan estraron: s-ro Kudela. vp. Neužil, skr. Pittner, kas. Štěrba, komit. Mastný, Mrázková, Srovnal. Dum la vintro 1929—30 okazis nur 1 esp. kurso gvidita de s-ro Neužil por 15 p. Mor. Esp. Pioniroj eldonis libron „Internaciaj Konvencioj pri fervojaĵoj“ kaj „Malriĉa knabo kiu ĝloriĝis“.

AFĖRO BISKE.

Poděbrady: La „fama“ S-ino Biske estis ĉi tie arestita la 22. X. kaj transportita al la regiona tribunalo en Kutná Hora, sekve de akuzo prezentita de F-ino Hlaváčová al la ĝendarmoj. Tiel finiĝas, bedaŭrinde skandale, la propaganda vojaĝo de la „apostolino“, kontraŭ

kiu avertis UEA kaj ĈAE jam antaŭ unu jaro.

Bratislava. Julio Baghy legis el siaj verkoj en kunveno aranĝita de Esperanto-Klubo en Albrecht-ĝardeno la 1. Julio 1930. Ĉeestis 40 personoj, kiuj atente aŭskultis la eminentan poeton kaj deklamanton.

Radio Bratislava. Kurso de esperanto komencis la 1. Oktobro 1930 kaj okazas ĉiun merkredon kaj sabaton je la 18.55 h. Instruas slovaklingve s-ro E. Wanitsek, kasisto de la urba ŝparkaso.

Bakov. S-ro Fr. Pytloun gvidas kurson por 12 komencantoj.

Mnichovo Hradiště. S-ro Pytloun el Bakov gvidas kurson por 25 personoj. Tio estas bona sukceso en la urbo ĝis nun preskaŭ netuŝita.

Praha. Lektorato de Esp. D-ro A. Pitlík gvidas de la 15. Oktobro praktikajn ekzercojn (du horoj semajne) en la Politeknika altlernejo. Plie li prelegas (1 horon semajne) pri la rilatoj de esp. al hindoeŭropaj lingvoj.

Praha. Dimanĉe la 12. Oktobro 1930 okazis plua esperanta prediko en la preĝejo de Sta Ursulo. Predikis D-ro Eltschknér, metropolitano kanoniko, prez. de Ĉs. Katolika Asocio.

Praha. Kurson por 11 komencantoj gvidas S-ro Šustr, vicprezidento de E. Klubo.

Klíč esperanta (český) vydaný Ĉs. Esp. Institutem je vhodnou propagační pomůckou. 100 výt. stojí 100 Kč. Jednotlivě po 60 hal. vyplaceně. Zašle Dr. Aug. Pitlík, Praha II., Křemencová 17.

Slovenský klíč esperanta vydaný Svazem po užijete při propagaci na Slovensku. 100 výt. za 80 Kč, jednotlivě za 1.20 Kč. Zašle Svaz nebo Dr. St. Kamaryt, Bratislava, Telocvičná 3.

Slovaka traduko de la Fundamento verkita de Škarvan estas ricevebla de la Esperanto-Klubo en Bratislava, Vydrica Strato, po Kč 10.60 afrankite. La interesantoj mendu ĝin senpere de la nomita klubo.

VÝHODY ESPERANTA PŘI CESTÁCH V CIZINĚ.

O tom, jak Esperanto jest užitečné i těm, kteří znají několik řečí, čteme zajímavý doklad v „Tribuně“ z 11. listopadu 1928, jejíž hospodářský redaktor B. Weiner vypráví o své cestě v Portugalsku. Citujeme:

„Jednou dopoledne potkal jsem na rohu ktereš ulice opřeného mladého Černocha — jest jich v Lisaboně dosti — s velikou pěticípou zelenou hvězdou, zapíchnutou v chlopni kabátu. A poněvadž podobný menší odznak zdobil též můj kabát, s úsměvem zadívali jsme se jeden na druhého a v brzku plynula zábava Čecha se synem Angoly — největší portugalské kolonie v jihozápadní Africe — v pomocném mezinárodním jazyce Esperantu. Chlapec 22-

letý, ženatý úředník, zrovna bez zaměstnání — lidí bez práce jest v Lisaboně hezkých pár tisíc — nic mu nebránilo, aby mě na příště nedoprovázel kamkoliv jsem si přál, nedělal mně tlumočnicka tam, kde bylo lze dorozumět se jen portugálštinou a neposkytl mně zajímavých a cenných informací ze svých dlouholetých znalostí velkoměsta a jeho obyvatel.“

„Navštívil jsem také delegáta Universala Esperanto Asocio — tato korporace se sídlem v Ženevě má v mnoha místech světa dobrovolné delegáty, kteří jsou zavázáni poskytovat členům U. E. A. bezplatné služby a činí tak zpravidla s krajní ochotou a přátelstvím. V Lisabonu je takovým delegátem vyšší úředník Banco de Portugal, p. Saldanha Careira, mluvící Esperantem plyně a s milým akcentem. Vyslovil jsem přání shlédnouti čtvrti spodních vrstev obyvatelstva, což není bezpečno bez průvodu policejního. Pan Careira měl dobré styky s policejním ředitelstvím, vedl esperantské kursy pro policisty a tak jsem se následujícího dne dožil milého překvapení, že ráno v mém hotelu vedle věrného černého João Franco očekával mě vážný policista s vyšitou esperantskou hvězdičkou na pravém rukávu, Antonio Maria Mateus, „policista N 1224“, jak má na své navštívence napsáno. A ten mě byl dán pro celý den k dispozici. Byl mě nápomocen v přihlašování u „governo civil“ i při některých obchodních návštěvách.“

OBRANA ESPERANTA.

Slovní svéráz jazyka. Proti esperantu se často namítá, že má slovník smíšený z různých prvků, hlavně románských a germánských. Říkají to většinou profesoři jazyků, kteří vychvalují národní živé jazyky a doporučují je jako mezinárodní. — Ale i řeči národní jsou směsí různých rodů a přece to nevadí jejich schopnosti výrazové. Jazyků čistých bez příměsí cizích v Evropě nenajdeme. Ba, co horšího, kmeny různorodé se skládají v jedno slovo, jež se ujme a jež nelze nahraditi. Angličtina má takové běžné bastardní slovo „beautiful“ (krásný), složené z prvku germánského a románského, a které se může odborníkovi zdáti takovou nestvůrou, jako kdyby někdo utvořil slovo „schönheitsplein“. Ve všech jazycích a i v přísné vědě se ujala slova, jako: auto-mobil, hydro-avion, mysti-fikace, homo-sexuelní, mon-ocle, tele-vise, krypto-vulkanický, poly-valentní, epicentrum, a tak podobně, jichž první část jest z řečtiny a druhá z latiny. A zase jiná jako: vélo-drome, ovo-logie, ovo-ídní atp., kde z latiny je převzata první část a z řečtiny druhá. Nejpodivnější svým původem a vývojem je obyčejné slovo „auto-bus“, jehož první část je řecká a druhá je pouhou troskou vzniklou asi na půdě anglo-americké z latinského tvaru „omnibus“, což je třetí pád množného čísla přídavného jména „omnis“ (každý). Němcům se snad podařilo aneb podaří nahraditi

slova: Automobil - Kraftwagen, Abonnement - Stammrecht, Logen - Saallauben, Telegramm - Drahtnachricht, Telefon - Fernsprecher, ale co to prospěje, jestliže nemohou odstraniti sloveso „telephonieren“, a když žádný Němec si nefroufá říci: „Ich habe es ihm ferngesprächen.“ A nepodaří se jim asi ani nahraditi slova nezbytná: Familie, Religion atp. Mají zde stejně malý úspěch ve svém přemrštěném purismu jako naši jazykoví břídilové à la Pohl v době obrození, kteří navrhovali místo cizích slov: student — knihovtipník anebo myslivář, kancelář — zá-mřežna, kuchyně — čudnice, palác — vzkvostinice, verš — zpěvovna, nos — vonocit atp. Zvyk je tyran a vzpírá se, když se mu diktuje něco, co se mu nelíbí. A jazykový zvyk je ještě urputnější. Rumunským romanofilům podařilo se vpraviti do paměti a úst části inteligence svého národa místo slovanských slov slova románská, jako místo „covaciul“ (kovář) slovo „fierar“, ale není jisté, zda lid je přijme. Při tom zůstal nedotčen výraz „drum de fier“ (železnice) řeckolatinský. A tak má rumunština dubleta, jedno slovanské a k tomu vždy synonymum románské: granica — frontiera, vreme — timp (čas), černeala — negreala (inkoust) a sloveso „a iubi“ (ljubiti, milovati) vedle podstatného jména amor (láska). — Proti takové puristické manii se vyslovil filolog Meillet, který prý se mezi jiným divil, že čeština nahradila slovo „teatr“, jež strpěli i Rusové a Poláci, slovem „divadlo“. Co by teprve řekl slovu chorvatskému „brzojavka“, které se ujalo za „telegram“. — Nemůže-li Angličan říci jinak větu: „I have visited this land“ (navštívil jsem tu zem) složenou ze slova původu latinského (visitare) a germánského (land), nemůže stejně Čech nahraditi cizí slova ve větě: „Dal jsem žebrákovi (něm.), který neměl ani košile (lat.), almužnu (řec.) a skývu (něm.) chleba (něm.)“ Řekne-li učitel: „Žáci, radím vám, kupte si papír, kalamář a inkoust. Ve škole je tabule a křída,“ nepromluvil k nim ani jednoho českého slova, nýbrž slova egyptská, řecká, latinská a německá, přejatá částečně z němčiny, částečně odjinud. Divné jsou osudy slov a svědčí krásně a zajímavě o mezinárodním putování kulturních statků za účelem vybudování kultury lidstvu společné, o níž usiluje také esperanto. (O slovech přejatých a cizích v češtině najde čtenář podrobné poučení v České mluvnici pro střední školy a ústavy učitelské od Gebauera-Ertla, I. díl, Hláskoskovi a nauka o slově, vydání deváté opravené, Praha, Unie, 1926, str. 161—170.)

Rudolf Fridrich, Brno—Král. Pole.

(Fino de p. 62.)

„Nu tiel, kiel vi ĝin skribis al mi: Bjúbenek, Svikóva.“

Profesoro Pertold ekridis. „Tiamaniere li ja ne povis kompreni vin. Bubeneč, Svecova oni ĝin legas. Mi miras, kiel la policisto povis tion diveni.“

„Al tiu mi tion montris skribita sur la papere to“, klarigis la fremdulo. Poste li profunde enpenis ĝis por momento kaj diris: „Sed ĝi estas stranga lingvo, tiu ĉefa, estante tiel elparolata. La angla elparolas tamen ĉion precize tiel kiel skribite.“

Instruistino: „Ansero enviis cignon pro ĝia plumaro kaj svelta kolo. Si klopodis simili al ŝi, sed ŝi ridindigis sin kaj la anseroj mokis ŝin. Kian instruon donas al ni tiu ĉi fablo? — **Lernantino:** „Ke ni ne volu esti io alia ol anseroj.“

DIVERSAJ INFORMOJ

K ĉi artikulo Sukero el ligno uveřejňujeme tyto vysvětlivky, omylem vynechané v min. čísle: **karciobisulfito** = dvojsířičitan vápenatý; **karbonhidratoj** = uhlohydráty; **polisakaridoj** = polysacharidy; **reagilo** = reagens; **fakule** = odborně; **diluíta acido** = zředěná kyselina; **kristaleta** = drobně krystalický; **nebuliĝita oleo** = rozptýlený olej.

Gvidfolio, bela 16-paĝa, ilustrita, pri Wien kaj Nieder-Oesterreich estas senpage ricevebla ĉe Komisiono por fremdulfrakvento, Wien VII., Messepalast.

K různým esperantským slavnostem, na výlety atd., objednejte si

ESPERANTSKÝ ZPĚVNÍČEK „KANTARETO“

Sestavil J. Filip. — Cena 1 výtisku Kč 7.—, 10 výtisků za Kč 50.— včetně poštovného.

Zasílá: Fr. Buhr, Praha XVIII., Břevnov 514; Účet pošt. úřadu šekového 209.037.

Zpěvníček obsahuje mimo písně duchovní a esperantské hymny, zvláště mnoho našich československých národních písní.

Mendu: Kĉ

J. Herben: Malriĉa knabo kiu ĝloriĝis (biografio de Masaryk)	16.—
Dr. E. Privat: Historio de Esperanto (1900–27), 200 p. lukse bind.	48.—
Remarque: En Okcidento nenio nova	45.—
Wells: La dormanto vekiga. broŝ.	40.—
Ŝilha: Uĉebnice esperanta se slov.	10.60
Kühnl-Procházka: Slovník česko-esp. váz.	25.—
Čánský-Riedl: Slovník esper.-český	21.—

Staĉi napsat objednávku na složenku Progresu.

Knihkupectví Jan Minář, Nymburk.



Ministerio de ĉs. fervojoj eldonis serion de 12 belaj poŝtkartoj kun bildoj de vizitindaj kasteloj ĉeĥoslovakaj, kun esp. teksto. — Jam venis 400 leteroj al la ministerio el la tuta mondo kun peto pri tiu ĉi senpage eldonajo. La sama ministerio eldonis pli frue ilustritan albumon (kun esp. teksto) pri la belaĵoj de la montaro Krkonoŝe (germana nomo Riesengebirge). Ambaŭ eldonoj okazis laŭ iniciato de D-ro A. Piřlík.

Bezplatné kursy esperanta nepořádejte. Kurs stoji penize (místnost, světlo, otop, reklama), i když učitel učí zdarma. Dostali jsme dokonce žádost, abychom zdarma „v naší tiskárně“ vytiskli plakáty na bezplatný kurs v Brandýse n. L. Aby vůbec nějaká tiskárna byla už naše, k tomu nám schází něco přes 100 procent její ceny.

Abononto. Kvankam ni tre ŝatas havi novan abonanton, ni ne povas lin akcepti sub tia kondiĉo, **kian** proponas al ni iu samideano: „Mi abonos por 1931, se vi senpage sendos al mi ĉiujn n-rojn aperintajn de aŭgusto ĝis decembro 1930.“

Kiu volas helpi en diversaj oficejaj laboroj poresperantaj (en Asocio kaj en Progreso), bonvolu skribi al ni. Ne nur por Prahanoj!

Trege nin konsolis la leteroj, esprimantaj ĝojon pro la rea aperado. Estas tamen agrable ricevi de tempo al tempo ion, kio montras al vi, ke via laboro estas komprenata kaj ŝatata. Kelkaj el la leteroj efektive estas plenaj de la kompreno por la malfacila situacio de la eldonanto. Ni kore dankas al ĉiu ankoraŭ unufoje publike. Ni daŭre faros nian maksimuman eblon.

LINGVA FAKO

24. PŘEKLAD TEXTU.

Překlady zaslali následující čtenáři a čtenářky, celkem 33 osob: Brettschneider Olomouc, Čiperová M. Plzeň, Feldmannová M. Zlaté Moravce, M. Görtlerová Praha, E. Grich Košice, A. Harna Želovce, Fr. Heikenwälder Prostějov, J. Hřebíček Benešov, L. Jakoubě V. Hamry, E. Janisch Praha, E. Klubo Hradec Králové, J. Kosina Praha, V. Kostrba Georgswalde, J. Kozlová Praha, Dr. J. Kristen Praha, F. Kuba Olomouc, F. Kučera Kunovice, Kuršanov en Nový Hradec, F. Machala Pržno, A. Nývltová Praha, F. Pavlica ?, Em. Pohlová Praha, J. Poláček Brno, Fr. Slavík Praha, V. Stříhavka Kladno, J. S. Fryštát, M. Šilhánková Plzeň, A. Štěpán Hostivař, A. Tyl Prostějov, Všeticka Určice, V. Žikovský Praha, X. Bratislava, XX en Y.

Ze všech dobrých prací vylosována byla práce p. L. Jakoubě V. Hamry. Zaslali jsme mu odměnou povídku estonského spisovatele Friedeberta Tuğlase: *Popi kaj Huhuu*.

Překlad 25. uveřejníme příště.

Lupo kaj sciuro. Saltadis sciuro del) branĉo al branĉo2) kaj falis3) ĝuste4) sur dormantan lupon. La5) lupo eksaltis6) kaj volis ĝin formanĝi.7) La sciuro komencis8) peti: „Lasu min for.“ La lupo diris: „Mi lasos vin for, nur se vi diros al mi, kial vi sciuroj estas ĉiam tiel ĝajaj. Mi estus ĉiam malĝaja, kaj kiam ajn mi ekriĝardas9) supren al vi, vi tie supre ĉiam ludas kaj saltas. — La sciuro diris: „Lasu min pli frue10) (foriri) sur la arbon, de tie mi tion diros al vi, sed ĉi tie mi timas vin.“ La lupo ĝin lasis, la sciuro forkuris sur la arbon kaj diris de tie: Vi estas malĝaja pro tio, ke vi estas malbona. La malboneco11) premas8) vian koron. Kaj ni estas ĝajaj, ĉar ni estas bonaj kaj al neniu ni faras ion malbonan.“

D o z n á m k y:

1. ne: el, nikoli z větve, nýbrž s větve.
2. též: de unu branĉo al alia — de branĉo sur branĉon — de unu branĉo sur alian —; nikoli: al branĉon.
3. defalis není o nic jasnější.
4. precize; direkte = en direkto al..., rekte zrovna (opak křivě).
5. člen „la“, poněvadž je to ten vlk a ta veverka, která je nám již z n á m a z prvé věty.
6. eksaltis (komprenu: el sia pozicio en kiu ĝi kuŝis); salte stariĝis.

7. nikoli: manĝegi, La bestoj manĝas kaj trin-kas. Iam ili, same kiel homoj, manĝegas kaj trinkegas.

8. staĉi; e k komencis obsahuje zbytečné ek. Stejně: premas vian koron místo kun pre-mas.

9. nikoli -os.

10. antaŭe.

11. zde zlost ve smyslu zlo, proto lépe mal-boneco než kolero.

26. TEXT K PŘEKLADU

Na poli teprve tři ohromné, pro ně připravené a s celého rozsáhlého pole sesbírané kupy nati ho rozveselily a rozradovaly. S chutí se dal s ostatními do práce. Ale nať i přinesená sláma byla mokrá, nechtěla chytati, a ke všemu dalo se do drobného, studeného deště. Dlouho prodíral se jenom nažloutlý plazivý dým nechvátavě mezi zčernalými bramborovými stonky, a zdálo se již, že budou nuceni vrátiti se, aniž okusili chutných pečených zemáků. Proto, jaká radost, když dým hustěji v prsten-covitých, šířících se chuchvalcích začal se valiti z kupky, a dokonce prošlehlý i plameny. Rychle bylo přikládáno a brambory přichystány do důlku mezi hroudami.

J. Vrba: Člověk boží.

Sekve de la froa laboro amasiĝinta mi el-lasis la paĝon de UEA; ĝi aperos en la venonta n-ro. O. Sklenčka.

Leterujo de la administracio. S. Kr. en Valtice: abono 1930. — L. B. en Liévin: Abono venis en februaro. Dankon. — F. V. Brno: Ni devas insisti, ke tiuj kiuj ne pagas ĝustatempe la abonon, kaŭzas al ni perdon de tempo kaj mono. Oni ŝuldas al ni multajn milojn, ne kalkulante tion, kion ni jam perdis dum jaroj 1924—27. Vin ni dankas, ke vi pagis ĉiam regule. Protesti kontraŭ neregula aperado per nepagado de la abono estas absurda. Ĉar ĝuste la nepagado aŭ la malfrua (post admono) rabas al ni la solidan financan bazon necesan por regula laboro. „Grumbli“ efektive ne helpas, sed: kunlabori, abonni kaj — abonigi. A. K. en O.: Por la unua n-ro vi pagis po 2 Kč, kvankam ĝi estis 24paĝa! Komprenu do, ke pagante 4 Kč por la lasta n-ro, vi nur egaligas la plion, ricevitan pli frue. Cetere por 120 p. de la jarkolekto vi ĉiel pagas sole 20 Kč.

Do vyčerpání nutně obsáhlých zpráv Svazových budou příští čísla opět přizpůsobena dřívějšímu rázu Progresu. (Red.)

Novinová sazba povolena ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze čís. 238.888 VI-25.

Eldonanto kaj responda redaktoro RUDOLF HROMADA. - Presis JAN MINAŘ NYMBURK.